# LIBERA TRIBUNO

## MONDFEDERACIO KIEL SOLVO?

En febr. k-do Ducret en „Letero el Svisio" demandas interalie: „Kiel savi la pacon, se la tutmonda socialistaro ne kapablas fari tion?" — Nu, k-do, mi konas nur unu rimedon, unu solvon, kiu estas sukcesiga. Tio estas formado de plena mondregno aŭ la unuiĝo de ĉiuj ŝtatoj de la mondo kun superŝtata registaro, kun konstitucio k mondpolico. Registaro, kiu estu elektata de la popolaro laŭ demokrata maniero. Ĉiu alia formado de internacia socio estas primitiva, nekontentiga k sensukcesa. Federacia mondregistaro servas la intereson de ĉiuj, indiferente de kia partio, religio aŭ raso. La laborista klaso, nur sola en batalo, ne povas malhelpi militojn; la pasinto pruvis tion. Por tio necesas grandega tutmonda popolmovado, k se multaj neŭtraluloj, eĉ burĝoj, volos fervore labori en tiu movado, ni ne lasu ilin solaj. Lanti jam diris: „Nur kiam la tuta mondo estos unu sola lando, la proletaro povos masoni socialismon". — Mi konsideras, ke ni devos puŝi tiun movadon en la bona direkto. Ĉar, ĉu ekzistas pli pozitiva socialista aktiveco ol batali kontraŭ la milito? Nekonscie k konscie la neŭtraluloj en tiu movado faras socialistan laboron, k al socialismo apartenos merito savi la pacon.

La Plenum-Komitato de SAT prave sendis publikan, leteron al la mondkunveno en Ĝenevo. En sekcia kunveno en mia loĝloko, gvidanto el la nederlanda movado por mondfederacio, d-ro Zonnenberg, petis nin klopodi kiel eble plej multe por enkonduki esp-on en la kongresoj aŭ konferencoj. Unu el la artikoloj de la Federacia Movado estas jena: „Se la federacia registaro plenumadas sian celon, laŭ la opinio de la Fed. Movado tutmonda, ĝi devos esti plenumata de la popoloj maturiĝintaj rilate mondsolidaron. Tial la movado utiligos ĉion, kio edukos ĝis mondcivitaneco k ĉiuflanka harmonio. — Sekve ili urĝe devas enkonduki la mondlingvon.

Mi ne scias, ĉu en Svisio ekzistas landa movado, sed k-do Ducret povos informiĝi ĉe: Cercles socialistes Fédéralistes et Communautaires pour une République Moderne, 19, rue de l'Echiquier, Paris-10. En Aŭstrio „Die Weltbürger", Getreidegasse 5, Klagenfurt; Italio: Associazone „Pax", Via Bruxelles 59, Romo; Germanio: Liga für Weltregierung, Leichtensternstr. 12, Köln-Lindenthal.

**D. Blanksma (20.346).**

## PRI EVOLUISMO

Responde al la demando de k-do Wölfel, ĉu mi rigardas lin k ĉiun dikredanton nekulturita, mi atentigas, ke mi asertis, ke nur tiu estas kulturita, kiu povas enigi la evoluteorion en sian mondkoncepton, kio volas diri, ke homo, havanta eble nur gazetkleron, kiu nenion scias pri evoluteorio aŭ estas indiferenta pri ĝi kiel besto, ne povas esti rigardata kiel kulturita. Egale estas ĉu li kredas al dio aŭ al nura hazardo, al kiuj ambaŭ mi ne kredas, sed kiel Budhano k Lamarkismano mi opinias, ke la volo k ena racio de la vivantaj (k eble ankaŭ de nevivantaj) estaĵoj kaŭzis la estiĝon de novaj vivoformoj k specioj. Tiun enan racion ni povas ekzemple konstati je ĉiu vundita aŭ malsana vivantaĵo, kiam ĝi mem kuraciĝas.

**E. Preibisch.**

## KIO ESTAS LA KVINA TAĈMENTO?

Kdo Ariadno agorde kun la de li legata gazetaro k aŭskultata radio fine k firme konstatis la naturon de la kvina taĉmento. Se tiu gazetaro k radio, kiuj inspiras lian artikolon (jan. no.) pli bone konus sian propran intereson, ili certe citus k-don Ariadno kiel plej elstaran specimenon de la efikeco de propagando.

Mi ne dubas, ke kdo Ariadno almenaŭ iom memoras pri origino de l' vorto „Kvina taĉmento". Se ne, eble hispanaj kdoj povus klarigi al li. Tiu esprimo naskiĝis en la heroaj tagoj de Madrido, kiam la hispana laboristaro devis defendi sian ĉefurbon kontraŭ kvar faŝistaj taĉmentoj atakantaj ĝin de ekstere k kontraŭ la faŝista perfido de interne. Tiu interna faŝista danĝero ricevis la faman nomon de la kvina taĉmento. La nocio forte radikiĝis en konscio de l' tutmonda proletaro — ĝi instruis la laboristojn detekti fortojn sekrete laborantajn kontraŭ popolo k libero. Tial ĝuste tiu nocio iĝis tro danĝera por la reakcio. Oni ne povis ĝin mortigi, sed oni provis ĝin ekspluati. Per persista propagando la reakcio sukcesis forgesigi ĝian ĝustan signifon. Ĝi sukcesis — almenaŭ rilate al parto de la laboristaro. La esprimo, kiu estis alarmkrio kontraŭ klasperfido, iĝis disbatilo de laborista klaso.

Ni atendu, ke post nelonge oni „korektos" la signifon de aliaj vortoj kiujn ni lernis malami. Eble post nelonge ni ekscios, ke Vichy-anoj estis malbonaj buboj, kiuj volis petoli kontraŭ la liberigantaj naziistaj amikoj, ke SS estis la nomo de judaj perfiduloj k kvislingoj estas aĉaj agentoj vendantaj sian landon al internacia demokratio.


Mi ne supozas ke kdo Ariadno efektive ne scias pri la ĝusta signifo de la esprimo „kvina taĉmento". Li estas tamen (senvole) atestanto pri sukceso de reakcia propagando.

**M. A.**

## ANKORAŬ IOM PRI EKONOMIA MASTRUMADO.

Kdo Hölzgen (en jan. n-o, sub supra titolo) skribis i.a. pri la monŝanĝado, ke oni povus eldoni 3 aŭ 4 seriojn da monbiletoj, el kiuj oni lotumus unu serion. La lotitaj biletoj devus esti ŝanĝataj kontraŭ novaj, kun depago de 10 %. Sed, laŭ mi, laiko sur la ekonomia tereno, se oni procedus, ĉe jarfino, al lotumado de l' biletoj, ĉiu vendisto aŭ komercisto rifuzus vendi sian varon, por ke li ne bezonu pagi la 10 %. Ĉar ja eblas, ke li por sia varo ricevis ŝanĝotajn biletojn: li do estus devigata pagi dek procentojn. Laŭ mi, la ideo de Belami meritas pli da atento...... kvankam mi tuj konfesas, ke, se la Hölzgena plano estus efektivigebla, la kapitalformado estus malebla. Ĉu neniu k-do povos al mi respondi pri tiu problemo?

**Joĉjo Marko (25.207).**



## LIBERPENSULA ANGULO

### Kiu progresigas la pacmovadon?

La plej solida fundamento de malamikeco k milito estas mensogo k trompo; tial necesas senvualigi la gravajn faktorojn, kiuj hodiaŭ teruras la tutan homaron. Plej malbona faktoro tiuspeca estas la religiaj eklezioj, kiuj ŝajnigas sin pacamaj, dum fakte ili konspiradas kun la militemaj potencoj en la socio.

La blinda kredo al tezoj de l' kristanismo, sen esploro pri ties fundo, kaŭzas la grandan trompiĝon, kiun ni konstatas. La instruo de Kristo tre malmulte akordiĝas kun la nuna aspekto de l' ismo lianoma.

Unue iom pri la origino de Kristo: laŭ Mateo Jesuo estis filo de David, filo de Abraham. La samon atestas la profeto Jesaja (ĉap. 9, v. 6—7), parolante pri la Mesio kiel „Princo de Paco"...... „por paco senfina sur la trono de David k en lia regno...... por fortigi ĝin per justeco k vero de nun ĝis eterne". Tian Mesion atendis la judoj; li estu el la genealogio de David...... Jesuo ne havis patron el tiu gento, k tial la judoj ne agnoskas lin, konsiderante lin, kiel Mateo mem, kiel filon de Jozef, edzo de Maria. Li estis Nazaretano (vidu Luko, ĉap 24), jen la vero; la instruo de l' eklezio pri „filo de Dio" estas fantazia mito. Li estis natura feto, produkto de vira spermo, de natura homo. Sed li havis la fiksan planon, esti konsiderata kiel Mesio laŭ la profetaj antaŭdiroj, k ĉio, kion li faris, adaptiĝis al tiu plano (Luko, ĉap. 24, v. 44).

Okaze de sia morto li estis ĉirkaŭita de amikoj, ekde kiam la ĉefpastroj transdonis lin al la romaj estraroj. Pilato ne volis lin kondamni, ankaŭ ne Herodo; la kirenano Simon portis lian krucon k Jozef el Arimateo, akiris la permeson de Pilato depreni lin de la kruco k entombigi lin en sia propra tombo, kiu troviĝis en lia ĝardeno, apud lia domo. Do, Jesuo ne mortis sur la kruco, sed estis flegata en la tombo, ĝis li havis la necesajn fortojn por eliri, k poste li certe loĝis ĉe la konsilisto Jozef el Arimateo.

Jesuo estis konscia pacbatalanto, atakis la fariseojn pro ilia maljusto, k tial ili malamis lin k celis lin mortigi. Laŭ Mateo (ĉap. 6, v. 9—13) li instruis la homojn preĝi pri teraj aferoj, k ĉielajn li tute ne menciis. Komprenu do, ke la eklezioj tre konscie instruas pri ĉiela paradizo k subtenas tiel la kruelan subpremadon de l' potenculoj al la homaro, kiu ne ekribelu. Se ekzistus diablo, ni parolus pri diabla mensogo, sed feliĉe diablo k infero ne ekzistas, escepte de tiu Infero, kiun la regantoj preparas al ni ĉi tie. La piuloj estas la plej grandaj kontraŭuloj de la paco, ĉar ili, kiel la fariseoj, defendas la maljuston. Senvualigu do la eklezajn mitojn k laboru por krei la regnon de Justo, kiun Kristo anoncis.

**J. Snekvik (23.277).**

**Ne devigu nin interrompi la gazetsendon! Pagu tuj vian kotizon!**